

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.
Aperas dufoje en la semajno (merkredo kaj sabato). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egalvaloro.

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 226
20. 12. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.

Redakciaj kunlaborantoj:

H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Kŭln, Germanlando

Abonprezo ponumera
de duonsemajna ekspedado: egal-
valoro de 0.20 sv. fk., mendita per
loka poŝtoŝeĉo 0.15 sv. fk.;
de semajna ekspedado (du numeroj
kune): 0.15 sv. fk.

Anonprezo
po unucifmra kolonero egalvaloro
de 2.— sv. fk. (antaŭpage 1.00 sv. fk.),
minimuma alieco 3 cm.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburg, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Al nia tuta geogantaro
ni deziras
ĝojigajn festotagojn!

Interesaĵoj pri Luksemburgo.

(Legu ankaŭ ET n-o 217 de 9 nov.)
(Vidu la du ilustraĵojn sur pĝ. 2 kaj 5!)

La lando Luksemburgo estas dispartigita en 12 kantonojn, 130 komunumoj kun entute 267 000 loĝantoj, el kiuj pli ol sesono loĝas en la 17 kvartaloj de la ĉefurbo. La administracio estas prezidita de ŝtatministro, nomita de la granddukino el la plimulto de la politikaj partioj (klerikala, liberala kaj socialista-laborista), kaj kvar ĝeneraldirektoroj. Aperas tie la ĉefaj gazetoj de la lando en germana lingvo, nur unu en franca, kaj humorista-satira en luksemburga dialekto, kiu similas al tiu de la germanaj moselanoj, intermiksita kun multaj francaj vortoj. Tamen ĉiu luksemburgano parolas ankaŭ la skribitan germanan lingvon kaj tri kvaronoj de la populacio ankaŭ la francan lingvon. Ambaŭ lingvoj estas instruataj en ĉiujrajdaj lernejoj de la lando; la konstitucio rekonas ambaŭ kiel oficialajn, sed la administracio kaj la juĝistaro preferas la francan, la religiaj kultoj la germanan lingvon. Ĉe la juĝejoj, la advokatoj parolas france, la atestantoj laŭ sia elekto.

Komerca foiro okazas ĉiujare de post 1922 dum fino de aŭgusto en la modernaj ejoj de industria lernejo kaj antaŭ ĝi. Sur apuda vasta placo okazas amuza foiro „Schobermes“, kiu kondukas ĉiun bonan luksemburganon en la „urbon“.

La tuta armeo konsistas el 500 volontuloj kaj muzikistaro; krom ili 160 ĝendarmoj dislokitaj sur kvardeko da stacioj.

La roko Bock, placo de la unua kastelo, konstruita de Sigefroy d' Ardenne dum 953, estas ligita al la urbo per ponto konstruita de la aŭstrianoj dum 1735 kaj entenas kazernojn trege grandigitajn sub Mario Terezia de Aŭstrio, viziteblajn dum la turista sezono. Je ĝia piedo komencas promenado „Kornico“ sur la malnova remparo (la dua datumas de 1050, la tria de 1390, la nova fortikaĵo de Vauban de 1686). Tiu ĉi interesege promenado kondukas tra la malsupra urbpartoj ĝis al la kapelo de S-ta Kvirino sub la viadukto, kondukanta de la stacio en la superan urbon, la plej malnova kristana sanktejo en la lando.

Ĉi-sube ni donas kelkajn specimenojn de luksemburga humoro.

Luksemburga humoro.

Pastro kaj paŝtisto. Oni rakontas bonan historion pri la antaŭa episkopo de Trier. Li estis bonkora sinjoro, kiu konversaciis volonte kun simplanimaj personoj. Foje suprenveturante montojn, li elveturigis por piediri kun sia sekretario kaj sekvigis la veturilon. Sur la monto staris lunulo kun ŝafaro kaj deprenis ĝentile sian ĉapon por saluti la sinjoron. Tiu alparolis lin jene:

„Kiom vi perlaboras jare, mia kara?“

„Oh, 17 talerojn, du kostumojn, du parojn da ŝuoj kaj dikajn jakon!“ respondis la junulo.

„Ej, ej,“ opiniis la sinjoro, „tiam mi perlaboras multe pli ol vi!“

„Ĉu vi do ankaŭ paŝtas?“ demandis mirigite la aĵa.

„Certe, mia kara!“

„Aha, eklumas... Vi certe havas ankaŭ porkojn kaj kaprojn en via bestaro!“

Jen kiel... Du najbaroj procesis dum ses jaroj pro puto.

„Kial vi ambaŭ nur povas malkonsenti pro tia malgrandaĵo?“ demandis amiko unu de ili.

„Estas simple,“ respondis tiu ĉi, „mia najbaro ja ankaŭ estas vinkomercisto!“

En la konservatorio patrino iutage demandis la profesoron de sia flineto: „Kion vi opinias, s-o profesoro, ĉu ŝia voĉo pli taŭgas por opero aŭ opereto?“

„Hm, hm,“ diris la profesoro, „plej bone por la kinematografo!“

Al Diekirch venis foje komparano kun fileto, por enskribigi lin ĉe la gimnazio. La direktoro demandis pri la kvalitoj de la junulo kaj inter alio:

„Ĉu li havas bonan kapon?“

„Tiu ĉi!“ diris la komparano, „ĉu li havas bonan kapon! Dum somero li falis dufoje de la ĉerizujo, sed lia kapo eĉ ne havis ŝvelaĵon!“

En Ettelbruck Jakobio fariĝis freneza. Turmentita meze de l' nokto li kuregas al hospitalo (centra frenezulejo de la lando) kaj sonorigas. Gardisto malfermas fenestron en la unua etaĝo kaj demandas: „Kiu estas tie?“

„Estas mi,“ vokas Jozefo, „mi frenezigiĝis, prenu min internen!“

„Mi tute ne intencas,“ respondas la gardisto, „meze de l' nokto; ŝajnas ke vi frenezigiĝis!“ kaj ree fermas la fenestron.

En la mallarĝvoja fervojo. Vojaĝanto al la kontrolanto: „Kion, diable, tio signifas? Kial la vagonaro ne haltis ĉe Rammerich?“

La kontrolanto: „Estas tial, ĉar la konduktoro malpacigiĝis kun la ŝafĉestiro.“

Kristnaskoflamoj.

Originala rakonto de Carla Staudner, Wien.

Ĉu tiu ĉi arbo ne estas belega arbo, precipe kiam ĝi estos ornamita! Kaj tiu, en la angulo, la granda, gracia — ĝi rekomencos nian penon. Kelkajn similajn, kaj la ĉi-jara vendado alportos ion pli da gajno ol la pasinta.

Tiajn parolojn ofte aŭdis tute malgranda pin-arbo antaŭ kristnaska tempo, kiam marĉandemaj urbanaj venis eksteren en la solenan trankvilon de la eneĝita arbaro por forpreni nombron da ĝiaj fratoj kaj amikoj por la „vendejo de kristinfano“), kiel ĝi aŭdis diri.

En la unuaj tagoj nia malgranda pineto ĉaĝrenis vidante malaperi la pli maljunajn ĝin protektantajn najbarojn, sed kiam ĝi rimarkis pli grandan pecon de la hela ĉielo dum tago kaj la gaje brilantaj steloj dum nokto, la ĉaĝreno baldaŭ ŝanĝiĝis je ĝojo, la vivkuraĝo ekvekigiĝis, la sopiro je la multkolora mondo naskiĝis kune kun la deziro sekvi kiel eble plej baldaŭ la fratojn. De proksime ĝi volis konatiĝi kun la homoj, kun la gajaj infanoj, kiuj ludante kaj kantante trankuris la arbaron dum helaj somertagoj.

Pineto do streĉiĝis alten, etendigis la branĉojn ĉiufankon por kreski bone egale kaj ankaŭ fariĝi „bela ekzemplero por la vendejo“. Tamen jaroj ankoraŭ pasis, ĝis pineto estis pino, sufiĉe granda por esti segata. Fine, kiam la segilo ruŝis ĝian trunkon, eĉ ne la doloro fizika, ne la adiaŭo de la kara kutima ĉirkaŭaĵo povis subpremi la laŭtan ĝojon ekvekita pri la penso pri la fina plenumo de mondofeliĉo kaj homamo.

Precipe ĉi tiun jaron nia pino esperis esti atestanto de speciala ĝojo. En la tagoj de aŭtuno ĝi aŭdis babilon la ekskursantojn pri granda misero, pri la ĉiam ankoraŭ vivanta malamo inter la nacioj, sekvo de la estinta milito, kiu malgraŭ la packontraktoj ne ebligas veran pacon — sed multaj ankaŭ babilis pri la helpemo de riĉaj popoloj por la malriĉaj, invitante milojn da infanoj kiel gastoj dum monatoj — kaj ankaŭ pri la sola rimedo de facila interkompreno kun alinacianoj oni parolis, pri la internacia lingvo Esperanto, kiu multe helpis militkapitojn ĉe la malamiko.

*) Christkindlmarkt = wiena dialekta esprimo.

Kuŝante sur la veturilo, kiu forportis ĝin al la urbo, pino revis pri la familio, kies infanoj ankaŭ estus revenintaj el gastema lando kaj estus rakontintaj pri fremdaj infanoj. La veturilo eniris urbon — kiaj grandaj domoj, kaj jen kiaj helaj lampoj brilantaj tra ĉiu fenestro kiel la suno tra la branĉoj de l' arbo. — Bedaŭrinde arboj sen radikoj — ĉu vi ne similas al mortintoj, kiuj estos revivigataj por arta vivo? Sed nia pino ne estis malgaja, kontraŭe ĝia kreskado en plena libereco valoris neniam kompare al la nekonzato, nur supozita „io“, kio espereble okazos.

La veturado urben, la restado sur la vendloko, la atendado esti aĉetota, ĉi tio estis tiel enuiga — tamen multo estis aŭdata, multo vidata en la najbaraĵo; la budoj estis plenaj de brilantaj ornamoj, plenaj de pupoj, ludiloj kaj sukeraĵoj.

Pino do senfine ĝojis povi brili kaj amuzigi infanojn! Horo post horo, tago post tago forpasis, fratoj estis forportataj, kaj ĉiuvespere, kiam la vendisto kuŝigis la arbojn, metante unu sur la alian, nia pino ankoraŭ estis inter ili. — Nenia dormo trankviligis la timon de nia arbo, ke nur ĝi ne povus atingi la revitan celon. Ĉu nur por ĝi ne estus aĉetonto, ĉu ĝi estus seniluziigita kun sia granda sopiro povi feliĉigi? Ĉu ĝi devus formori sen ornamo, sen kandeletoj?

Kaj sopirante la tremanta pineto murmuris tre mallaŭte: Bona Dio, nur unufoje lasu min aŭdi la gajan ridon de feliĉaj infanoj, vidi iliajn radiantajn okulojn, nur unufoje, bona Dio!

Kaj vere, tre frue matene, kiam la starioj ankoraŭ estis en duonlumo, beleta juna virino venis kaj aĉetis la graciajn pinon, alportigis ĝin en simplan propran domon kaj starigis ĝin en malgrandan jam feste ordigitan ĉambron, fermis ŝlosile la pordon kaj lasis pineton sola. Kio nun? Baldaŭ ĝi aŭdis infanojn ridi ekstere — kial do ĝi devas resti ĉiam ankoraŭ sola, sen ornamo, sen lumo? En abomeninda malpacienca pasis la tago sen feliĉo.

Krepusko jam malheligis ĉion ĉirkaŭe, la voĉoj de l' infanoj subite ĉesis, kaj la tuta loĝejo ŝajnis dormi — subite la pordo estis malfermata, la juna patrino kun grandaj skatoloj plenigitaj de sukeraĵo, stelo, ĉenoj, vitrobuloj, kandeletoj ktp. eniris kaj kun lertaj fingroj aranĝis la festvestaĵojn de nia pineto. La branĉoj kurbigis sub belaj kaj bonaj aĵoj.

Nun pino sciis, ke la revo estos plenumata. Tamen restis ankoraŭ spaco da tempo, dum la ornamita arbo povis sin admiri en la speculo kontraŭ ĝi kaj sufiĉe admiri pri sia beleco. Lu eniris, lumigis kandelon post kandelato, laŭte sonorigis la sonorilon ekstere, kaj du infanoj staris mirigite, blindigitaj en la malfermita pordo.

Feliĉegaj la infanoj, feliĉega la pino. Post la unuaj minutoj da ĝojo la gepatroj, tenante la manojn de la infanoj, komencis kun ili la belan kanton de kristnasko: „Paca nokto — sankta nokto!“ — Sed tio ne estis la lingvo ĉiam aŭdita en la arbaro, pensis pineto — kaj jam la knabo kriis: „Nun ni ankaŭ kantu nian esperantan himnon, kiun ni lernis ĉe niaj esperantaj gepatroj!“ Voĉoj de infanoj profete kantis je kristnasko, ke denove „en la mondon venis nova sento!“

La kanto finiĝis, la infanoj alproksimiĝis la arbon, volante vidi de tute proksime la belajn — jen la lulilon el marcipano, jen la domon el sukero, jen la pupon pendantan per ora ŝnuro, kaj — kaj — kaj — ĝojo sen fino.

En la koro de la pino ekstremis la ĝojego — flamu, brilu, donu al la infanoj vian tutan amon, kurbigu por ke ili vidu ĉion ĝis la pinto — la malgranda knabeto kun la belegaj okuloj tiris ferme je ora papersaketo — la kandeloj ekbrilis subite pli helaj, briletaĵo kaj papejaĵo ekbrilis, kaj ektimigita la infanoj forkuris kriante. La gepatroj ekrimarkante la danĝeron momente ekblovis ĉaĝrene la lumojn kaj admonis la infanojn.

Malĝoje nun staris la pino en la angulo — ĉu ĝi faris malbonon per sia amo? Ĉiuj foriris en alian ĉambron, la infanoj kunprenis la ludilojn,

*) Aludoj pri la gastado de aŭstraj infanoj ĉe eksterlandaj samideanoj.

kaj pineo restis en la malhela ĉambro; nur de la sirato enpenetris lumbrileto tra la fenestro, kaj en tiu sola radio vidis en la spegulo — la rompitan branĉon, kiu pendis malsupren kiel rompita flugilo.

Senfina malĝojo kuŝiĝis sur la pinanimon. Estas do tiel malfacile ami la homojn, ĉu la vivo kun ili alportas tiom da sufero? En la arbaro ili ŝajnis tiel gajaj kaj simplaj. Kaj la pino sopiris reen al la arbaro.

La infanoj revenis la proksiman tagon, ludis en la ĉambro, prenis eĉ sukeraĵojn de la arbo, sed nur de la plej malaltaj branĉoj. Tio estis nenio — la vera ĝojo forflugis, kaj honteme kaŝiĝis la nobla animo de l' arbo. — Al la mortantaj branĉoj fanfaronis senitiva brilajo.

Superlativoj.

Parolante pri rekordiferoj kaj eksterordinaraj aĵoj ni citas plejofte Usonon kiel landon de la superlativoj. Tamen tio estas nur parte vera. Interesan liston pri la plej grandaj, etaj, aĝaj, laŭtaj aĵoj de la mondo kaj ilia origino ni trovas en „Leipziga Ilustrita Gazeto“:

La plej alta konstruaĵo de la nuna tempo estas la „Eiffelturo“, 300 m alta; la plej alta domo estas la „Wool-Worth-Building“ en New York kun 55 etaĝoj, kies turpinto estas 256 m super Broadway.

La plej vasta stacio de l' mondo estas la „Grand Central Terminal“ de la „New York-Central kaj Hudson-Fervojo“; la plej granda parto de ĝia instalajo esas subtera. — La plej rapida vagonaro estas la „ekspres“-vagonaro inter London kaj Liverpool, kiu senhalte traveturas linion de 91 anglaj mejloj dum 87 minutoj, t. e. veturrapideco de 100 km po-hore. — La plej longa tunelo estas ankoraŭ la „Simplon“-Tunelo, 20 km longa. — La plej longa ponto estas la viadukto de Caohing en Ĥinuĵo, kiu kun siaj 40 000 arkoj kaj je larĝo de 1½ m sin etendas super valan malaltajn, kaj kiu ne servas kiel fervojo, sed kiel piedira kaj veturila interkomunikilo. —

La plej granda ŝipo estas ankoraŭ la germana vaporŝipo „Bismarck“, kiu nun veturas je la nomo „Majestic“ de la „White-Star-Line“ de Southampton al New York. —

La plej granda alteco atingita de aviadistoj estas 12 444 m. —

La plej impona lumturo de la mondo staras sur monto proksime de Dion; ĉe klara vetero ĝia lumo estas videbla je distanco de 400 km. —

La plej granda dinamo-instalajo de la mondo estas la „Queenstown-Works“ ĉe Niagara. —

La plej granda teksostablo kun 25 m da longo troviĝas en saksa teksejo. —

La plej granda naĝdoko estas la 40 000 t. naĝdoko de la iama ŝipfarejo en Kiel.

La stelo plej proksima al nia tero estas la eta „Alfa Centauri“, la plej hela Sirius. —

La plej alta monto de l' tero estas „Mount Everest“ en Himalajo, 8 882 m alta; kiel plej altan monton de Eŭropo oni nomas ordinare „Mont Blanc“, 4 810 m alta; sed en realeco tio estas



Nova ŝtona ponto en la urbo Luxemburg super la valo de la Petrusse (47 m alta, 84 m longa). Ŝtata kreditinstituto. Direkcio de la fervojoj.

pinto de „Elbrus“, 5 629 m alta, en Kaŭkazo. — La plej alta monto en Afriko estas „Kilimandŝaro“, la plej alta en Sudameriko ne „Cimboraso“, sed aŭ „Akonkagua“ aŭ „Huascan“ en Peruo.

Sub la neĝo dormantaj.

La lastaj vortoj de la bela malnova kristnaska himno ĵus estis kantataj per la dolĉaj voĉoj de kelkaj feliĉaj gejunuloj, kiuj kune sidis ĉirkaŭ la kameno iun antaŭkristnaskan vesperon; kaj sur la vizaĝo de ĉiu el tiu familia rondo la lumo de la brulanta ŝtupo montrigis feliĉon; la junaj — feliĉaj en la nuneco, kaj okupataj je esperplenaj antaŭ-sentoj por la estonteco; la maljunaj — egale feliĉaj kiel la junaj, kaj ĝuantaj multajn memorojn de la estinteco.

„Venu, Onklo Johano!“ diris unu brilokula, blondhara belulino, super kies kapo ne pli ol dek kristnaskaj tagoj estis superpasintaj. — „Mi petegas, ke vi rakontu al ni historion; vi scias, ke ni ĉiam atendas unu de vi.“

„Nu, mia bela nevino,“ li respondis, „mi timas ke mi estas eluzinta mian provizon de fantomoj kaj koboldoj, kaj se mi rakontos nun, ĝi devas esti el la malvarma mondo de fakto, kaj mi kredas, ke tio ne estos tiom interesa kiam la romantikaj romanoj, kiujn mi donis al vi dum antaŭaj tempoj.“

„Tute ne, faru al ni rakonton, veran rakonton — ni estos multe pli interesataj, kiam ni scias, ke ni aŭskultas pri io, kio vere okazis. Komencu tuj, mi petas.“

Frapante la cindron el la pelvo de sia pipo, kaj zorge apogante ĝin kontraŭ la fajrbreto, li komencis:

„La sonoriloj de la fabrikejoj estis ĵus finintaj sian sonoradon kaj la fajfligejoj estis elsendintaj siajn lastajn kriegojn, similaj je la mortantaj kriegoj de turmentita diablo, dum la horloĝo de la malnova preĝejo sonis la sesan horon, je unu el la plej mizeraj el decembraĵoj. Alte sur sensirma monteto staris malgranda dometo per kalko blankigita, el kies pordo elvenis du infanoj verŝajne ĉirkaŭ dekjaraĵoj. Dum ili ekpaŝis en la malvarman matenan aeron, ili ektremis kaj altiris siajn nesufiĉajn vestojn al si.“

„Nu vi devas rapidi, jam sonis la lasta zumegilo, nur restas al vi dekkvin minutoj,“ ekkrisis voĉo de interne.“

Estis tre malfacile por la du, atingi la ĉefvojon, ĉar la tero estis kovrita de glacio, sur kiun faladis pluvneĝo, kaj la vento je subitaj ekblovegoj fajfis ĉirkaŭ ili, minacante je preskaŭ ĉiu paŝo faligi ilin. Sed ili ne havis tempon pensi pri tiaj aĵoj; glitante kaj kurante, donante unu al la alia laŭ sia povo helpon, ili antaŭenpuŝis en la direkto de la fabrikejo — la timo de malfruigo venkante ĉiujn altajn konsiderojn.

„Rapidu, Suzi“, diris la bubeto, kiun ni konsiderus estis la pli aĝa el la du. „Rapidu, aŭ ni ne povos esti tie ĝustatempe; nu, starigu, vi ne vundis vin, ĉu ne?“ li diris, kiam por la tria fojo ŝi falis sur la glitiga frotuaro.

Ameme li helpis ŝin restarigi, sed kompatinda Suzi ja suferis doloron, kaj kvankam ŝi penegis reteni la larmojn kaj sukoti la plorgemojn, Tomĉjo ekvidis, ke ŝi suferis severan doloron.

„Ho ve“, li ekdiris, „ne ploru; kie vi sentas doloron? Nu apogigu je mi kaj mi portos vian mangokorbon.“

„Ho Tomĉjo, mi vundis mian kruron, mi ne povas antaŭeniri pro la doloro; vi devos lasi min, ĉar mi estas certa, ke mi estos malfrua.“

„Eble ne — vi sentos pli bone post ne longe, — metu vian brakon ĉirkaŭ mian ŝultron, vi nur estas malpeza; mi preskaŭ povus porti vin, se la vojo ne estus tiel glitiga. Trinku el la teujo, ĝi ankoraŭ estas varma, kaj tiam vi sentos pli bone; kaj se ni estos iom for malfrua, mi kredas, ke oni enlasos nin ĉi tiun matenon.“

Suzi trinkis iom de la teo kaj vivigite per ĝia varmeco ŝi denove penis daŭrigi sian iradon. Sed estis malrapida laboro, Tomĉjo faris sian eblon helpi ŝin, kaj penis gajigi ŝin laŭ sia povo, sed kelkfoje larmo ekfalas de liaj okuloj, ĉar liaj fingroj sensentiĝis pro la malvarmo, kaj li sentis, ke la pluvo jam trapenetris al lia haŭto, kaj la timo de malfruigo, kaj la pensado pri la deviga atendado ekstere en la malvarmo dum du horoj, estis sufiĉe per si mem timigi la koron de tiu plaĝa kaj pliforta ol li. Eĉ la urbo-gardisto, dum li preteriris, turnis sian lampon je ili dum unu momento kaj ekĝemis. Ne estis lia afero, — sed sub lia nepetrebila surtuto batadis palra koro, kaj li murmuris dum li paŝadis sur la senhoma strato: „Dank al Dio, ili ne estas la miaj.“

Sed ni devas lasi ilin daŭrigi laŭ ilia povo la malĝajn iradon, dum ni revenas ekrigardi la loĝantojn de la dometo, el kiu ni vidis la du eliri. Ĝi estis unuetaĝa konstruaĵo, konsistanta el unu ĉambro kaj unu kuirejo; en unu angulo staris lito, sur kiu kuŝis pala, malgrasega juna viro, verŝajne ne ankoraŭ tridekjara; li dormas, sed pro la mallongaj rapidaj spiroj ne estas malfacile diveni, ke liaj plej bonaj tagoj estas finitaj. En alia angulo kelkaj skatoloj estas aranĝitaj por servi kiel lito, nun malplena, sed de kiu la du malgrandaj laboristoj nur lastatempe levigis.

Kruĉo da herbeo staras sur la tablo. La fajro nur brulas malhelve kaj ĝia lumo apenaŭ videbligas la ĉirkaŭajn objektojn. En seĝo kontraŭe sidas juna virino, kies vizaĝo estas tiel malgaja kaj zorgiaca, ke unu ekvidu vekigas la

Lago plej alte kuŝanta estas „Titikaka-Lago“ en la Andoj, en alteco de 4000 m; la plej malalta enlanda lago estas „Bajkal-Lago“ en Norda Siberio, en malalteco de 1500 m. —

La plej profunda borĉavaĵo de l' tero, 21 536 m profunda, kies temperaturo estas 77,8° Celsius, situas apud Fairmont en Usono.

La plej malvarmega loko estas proksime de Werhosansk en Siberio, kie ofte regas temperaturo de 70° da malvarmo kaj kie la humo restas glacia ĝis profundeco de 1 m eĉ somere.

La plej aĝa arbo estas marĉa cipreso en Meksiko, kiu laŭdire havas 6 000 jarojn. — Tujarbo proksime de Hennesdorf en „Oberlausitz“ oni taksas pli aĝa ol 1400 jarojn. — La plej grandan floran havas „Befferia Arnoldi“ en Sumatra, t. e. 1 m da diametro. —

La plej granda vivanta besto estas grenlanda baleno, la plej eta mambesto la okulhara pimbusa muso, havanta longon de apenaŭ duontingoj. —

La plej laŭvoĉa birdo estas la tielnomata sonorilbirdo, granda eble kiel kolombo kaj vivanta en Afriko. —

Por kompletigi la liston oni permesu al ni aldoni, ke la plej simpla kaj praktika lingvo estas Esperanto, kion la aŭtoro de la menciita artikolo sirangamaniere forgesis.

La klerulo kaj la rabisto.

De Chamfort*.)

El franca lingvo tradukis El Reg.

Abato de Molières estis simpla kaj malriĉa viro, nescianta pri ĉio, escepte de liaj verkoj pri la „Descartes“a sistemo. Li ne havis serviston kaj laboris en sia lito pro manko de hejligno, la duonpantalono sur sia kapo, super la ĉapo, la du flankojn pendantaj dekstre kaj maldekstre. Iam matene li aŭdis ekfrapi sur sia pordo.

„Kiu estas tie?“

„Malfermu!“

* Chamfort (1741—1794) estas franca verkisto, spirulo, timinda po malko. Li verkis kelkajn anekdotojn en tono rapida kaj carma kaj kelkajn kernecajn maksimumojn deĝiiri el ili en lia ĉi numero. En la jena anekdoto oni rimarkas la koncizecon kaj la movecon.

simpation; kaj el ligajo de ĉifonitaj vestaĵoj sur siaj genuoj venas la malforta plorado de neripozebla infano. La unutona tiktako de malnova horloĝo krom tio aŭdigas, ankaŭ la longspira sopirado de la juna patrino kaj la rapida spirado de la dormanta viro. Kelkfoje la vento fajfas pli alte tra la fendetoj de la pordo, kaj la pluvo batas pli forte kontraŭ la fenestro. La patrino venas pli proksime al la areto da ruĝaj cindroj, kaj ĵetas fimeman rigardon unue al la fenestro kaj tiam al la lito: alia ekĝemo, kaj tiam la supersarĝeco de la koro superfluas el la okuloj, kaj la brilantaj larmoj rapide faladas sur tiun tre amatan infanon.

La horloĝo ĉe la preĝejo sonoras la kvaran post la sesa — ĉi tio instigas la patrino denove flankenigi siajn proprajn malĝojn; la vento ankoraŭ fajfegas, kaj la pluvo batas kun nemalpliigita furiozo kontraŭ la fenestro: ŝiaj pensoj estas kun la du etuloj, kaj tremo skuas ŝin dum ŝi ektimas, ke al ili estos malpermesate eniri. La viro moviĝas lacege sur sia lito, kaj malfermante la okulojn li ekrigardas sian edzinon. Ŝi tuj rapidas al li.

„Ĉu ili ekiris, Beĵo?“ li demandas.

„Jes, ili ekiris, kaj mi esperas, ke ili estas tie antaŭ ol nun.“

„Sonas tre venetece. Ni neniam penis, ke ni venus al ĉi tiu stato antaŭ deku jaroj, Beĵo, — kaj ĉio venis pro mi.“

„Ne, Jaka, ne diru tion — vi scias, ke neniu el ni povas ĉiam kontraŭstari la malsanon, sed kiam la printempo venos, vi plifortigos, kaj la aferoj ne estos la samaj.“

„Tio estas vera, virino, — mi sentas, ke tio estas vera — la aferoj ja estos nesamaj, kiam printempo alvenos, kaj antaŭ ĝi venos, mi fimas. Ĉu vi iam enliktiĝis dum la nokto?“

„Ne, mi ne povis enliktiĝi, ĉar la infano estis maldormema. Sed mi dormetis iom en la seĝo: ne ĝenu vin, mi zorgos por mi mem. Ĉu vi deziras trinki teon?“

„Aŭskultu“, li diris, „jen nia Suzi vokas, mi estas certa, ke ŝi vokas. Malfermu la pordon!“

Ŝi flugis malfermi la pordon, kaj la ventego furioze blovis en la ĉambron; la neĝo jam faladis dense: ŝi streĉis la okulojn kaj vokis: „Suzi, Suzi!“ sed nenia respondo aŭdigis: tamen ŝia koro doloris, kaj la penso ke ŝiaj karuletoj estas en tia ventego tremigis ŝin. Sed necese ne scias leĝon, kaj je la malgrandaj mongojn de ĉi tiuj du infanoj dependis la ekzistado de ŝi kaj ŝia edzo.

„Mi kredas, ke vi eraris, Jaka; mi ne povas vidi ion,“ ŝi diris dum ŝi fermis la pordon kaj revenis.

Li tiras la ŝnureton, kaj la pordo malfermiĝas. Abato de Molières, ne rigardante:


„Kiu estas vi?“
 „Donu al mi monon!“
 „Monon?“
 „Jes, monon.“
 „Hal! Mi komprenas, vi estas rabisto.“
 „Rabisto aŭ ne, mi bezonas monon.“
 „Ja vi bezonas? Nu serĉu interne!“
 Li klinas sian kolon kaj prezentas unu el la flankoj de la duonpantalono. La rabisto esploras:
 „Nu, ne estas mono.“
 „Tute ne; sed estas mia ŝlosilo.“
 „Nu, tiu ŝlosilo...?“
 „Tiu ŝlosilonprenu!“
 „Mi ĝin havas.“
 „Iru al tiu papersranko! Malfermu...!“
 La rabisto enmetas la ŝlosilon en seruron de alia tirkesto.

„Forlasu do, ne malordigu! Tie estas miaj skribaĵoj. *Ventrebleu***, ĉu vi finos? Tio estas miaj skribaĵoj. Al la alia tirkesto, en ĝi vi trovos monon!
 „Jen ĝi estas!“
 „Nu, prenu! Fermu do la tirkeston...!“
 La rabisto forkuras.
 „Sinjoro rabisto, fermu do la pordon! Li lasas la pordon malfermita! Kia hundsмила rabisto! Estas necese, ke mi ellitiĝu je tiu malvarmo! — Malbenita rabisto!“
 La abato saltas el la lito, tuj fermas la pordon, reenlitiĝas kaj laboras plue, ne pensante, eble, ke li ne havas monon por pagi sian vespermanĝon.

**) *Ventrebleu* — Franca interjekcio de kolero.

Vintra Idilio.

En agrabla ĉambro nia, ĉe skribotablo sidas mi; ĉe brulanta la fajrujo diligente brodas vi.
 Neĝas... Ĉirkaŭ domo nia muĝas kun kolero la vent'...
 Pli feliĉa ni nin sentas sub fidinda la tegment',
 Plumon mian mi formetas kaj rigardas vin kun am'; sur vizaĝo via dancas la rebrii' de fajra flam'.
 Dolĉe mi alproksimiĝas, preme ĉirkaŭbrakas vin; kapon vian vi ekklinas al brust' mia, amatin'.
 Lipoj flustras, kisoj tintas en sekreta la silent'...
 Neĝas... Ĉirkaŭ domo nia muĝas kun kolero la vent'...
Jan van Schoor.



Clerv (Clervaux) en Luksemburgo kun benediktana abatejo (maldekstre).

La gobeleno.

En angulo de flama salono sur la blanka marmora soklo staras ĉasantino.
 Ŝi estas gracia, juna virino duone nuda. Ŝia dekstra suprenlevita brako celas per lanco ian

longe iu preterpasanto ne povus ekvidi, ke frato kaj fratino kviete dormadas tie, volvitaj en siaj mortkitoj el neĝo.
 La zumado de radoj ĉesis; la laboristaro rapide eliras por siaj matenmanĝoj; kelkaj mallongaj minutoj, kaj la malbelsonaj fajfegiloj el-kriaĉas sian vokon al laboro. Tomĉjo kaj Suzi, kie ili estas? La pordoj tre baldaŭ denove fermiĝos!
 Lasu ili fermiĝi, aliaj pordegoj jam malfermiĝis por la du malgrandaj suferantoj. La pordegoj el perloj jam svingis malfermitaj je siaj oraj ĉarniroj; nenia malagrabla voĉo de severa fakestro salutaĉas ilin je ilia eniro, sed tiu glora bonveno, „Venu, vi benitoj“, kaj iliaj malligitaj langoj unuigas je laŭta „Hoziana“.

II.
 Noktiĝis, kaj la vento preskaŭ forblovis sian forton. La neĝo jam ĉesis faladi, kaj la luno malsupren rigardas la montetojn sub ilia senmakula kovraĵo, versante sian molan mildan lumon super ĉio. La malgranda dometo sur la monteta flanko estus nevidebla, se ne estus la lumo, kiu eliĝas tra la fenestro kaj la malfermita pordo. La horloĝo ĉe la preĝejo ĵus sonoris la okan, kaj dum preskaŭ unu horo virino staris rigardante al la urbo, ŝia maltrankvileco pligrandigis ĉiumomente. Ŝi aŭskultas por la sonado de piedpaŝoj sur la krispa neĝo — ili pliproksimiĝas — ili estas kontraŭ la flankirejo, kiu kondukas al la domero: sed ili preterpasas.

Denove kaj denove ŝi aŭskultas; — unu — aŭ dufoje ŝi imagas, ke ŝi vidas du infanojn en la malproksimeco — sed ili ne venas. Preterpasantoj plimalofitiĝas; denove la sonoro de la horloĝo, kaj ĉio estas senmovita. Ŝiaj edzo kaj infano dormas. Ŝi rapide surmetas sian ĉapon kaj ŝalon, kaj kuras al sia pli proksima najbarino por peti, ke ŝi iru kaj restu kun ili, ĝis kiam ŝi revenos ĉar ŝi devas iri por ekscii, kial siaj infanoj ne revenis hejmen. Ŝi ne timas neon nek ricevas neon; tuj kiam ŝi estas klariginta la aferon, la bonulino diras: „Resti kun ili, mia bubino, certe mi tion faros, kaj vi.“ Ŝi diris sin turnante al sia edzo, „surmetu vian ĉapelon kaj surtuton kaj iru kun ŝi!“

„Ho, ili nur ludas je neĝbalo aŭ glikturas iom.“ li diris; — samtempe li surmetis sian ĉapelon kaj surtuton, kaj tiom volemon iri por serĉi, kiom ŝi mem.
 Malluna Berto metis en sian multtenuan poŝon tekukon kaj du ovojn, kaj prenante la teujon, en kiun ŝi metis bonan provizon da teo, ŝi pretiĝis sin ekiri; sed subite rememorigante, ŝi ekiris al

objekton, la maldekstra retenas per streĉita ĉeno furiozan ĉashundon.

La atento de l' virino kaj de l' besto estas fiksita al nevidebla ĉasaĵo, kiu, laŭ la esprimo de okuloj de l' grupo, certe estas samtempe minaca kaj ruza.

Molaj radioj de la ĵus kuŝiĝinta suno trapenetras la diverskolorajn vitrojn de l' gotika fenestro kaj falas, kvazaŭ aro da grandegaj tremetantaj papilioj, sur la ĉasantino.

Kaj sub la ektuŝo de tiuj papilflugiloj, kiel sub la ektuŝo de sorĉa vergeto, revivas la marmora virino, kaj kvazaŭ rideto ekaperas sur ŝiaj iom malfermitaj lipoj, kaj delikate ruĝetiĝas ŝia gracia korpo kaj diafanigas ŝiaj subtilaj marmoraj fingroj, nur la hundo restis sovaĝe furioza malgraŭ la peno de l' sunefektoj.

En alia angulo de la salono regas mallumo. En nigra altega apogseĝo sidas ĝiba arlekena vestita per ruĝa mantelo. Liaj sekaj kruroj estas firme tegitaj per ruĝaj ŝtrumpoj, sur la piedoj — akrepintaj ŝuoj, bukitaĵ per grandaj diamantaj agrafoj. Konusforma ĉapeto kun oraj sonoriletoj sidas profunde sur lia kapo.

En la manoj li tenas liuton. La ombroj per larĝaj, grizaj kaj nigraj makuloj kuŝiĝas sur lian korpon kaj pliprofundigas la gravajn sulkojn de lia tragedia vizaĝo.
 Super lia kapo sur la pinto de la dorsapogilo de l' seĝego sidas korvo kaj per la beko penas pinĉi la sonorileton de l' arlekena ĉapelo.

M. Kalina.

La leono.

Fablo.

En pratempoj validis inter la bestoj la rajto je libereco kaj egaleco. Ciu kreitaĵo estis libera, kaj neniu estis submetita al alia.

Sed jam tiam la bestoj sufokadis: ĉar la leono estis pli forta kaj pli manĝema ol ĉiuj kaj englutis ĉiujn kreitaĵojn, kiuj ĝi povis kurafingi; baldaŭ neniu bestospeco ekzistis, kiun ĝi ne enfunebrigos.

Fine kolektiĝis la persekutitoj kaj interkonsilis pri rimedo, kiamaniere fini tiun bedaŭrindan staton.

sia filino: „Sara, havigu tiun suĉbotelon, kaj pleniĝu ĝin per lakto por la etulo, kaj nun, se vi du nur revenigos la du infanojn, mi vidos ke ĉio iros bone hejme.“

Beĵo ekkomencis esprimi dankojn, sed Berto rifuzis aŭskulti ŝin kaj nur admonis sian edzon „rapidu“.

Beĵo kaj Malluna Abĉjo sin turnis al la direkto de fabrikejo, sed ofte demandis preterpasantojn, ĉu ili estas vidintaj la du perditojn, sed ĉar estis tiom da aliaj geknaboj, kiuj multe similis tiujn, kiujn ili serĉis, ili konsideris, ke estus pli bone iri rekte al la fabrikejo, por demandi, je kioma horo ili ekiris.

La koro de Beĵo pleniĝis je dubo, kiam ŝi frapis je la domo de la pordgardisto; nedifinebla fimego venis al ŝi, kaj ŝi apenaŭ sciis, kiel klarigi sian aferon. Ŝi tute ne pensis, ke ne pli malproksime, ol ŝia voĉo estas aŭdebla, kuŝas la karaj etuloj, kiujn ŝi serĉas, centoj da piedoj estis preterirantaj ilin dum la tago, sed neniu maltrankviligis ilin; la fajfegiloj vane kriegis por ili, ĉar ili estis irintaj al tiu daŭra „ripozo preterita por tiuj, kiuj estas lacegaj kaj supersarĝitaj.“

De la pordgardisto ili sciigis, ke la du alvenis tro malfrue por eniri frumatene kaj estis forintaj tien, sed ne revenis poste, kaj ankaŭ neniu estis vidinta ilin. Beĵo staris rigide dum unu momento, apenaŭ sciante, kion fari, sed Malluna Abĉjo povis sudi la aferon pli egalanime; kaj prenante ŝian manon, li delikate forkondukis ŝin, kaj tuj ekiris al la policojo, kie li donis tiel bonan kaj akuratan priskribon kiel li povis pri la du perditoj. Nur bezonis mallongan tempon fari tion, sed la hejmirado ne estis tiel rapide farita. En ĉiu malluma angulo ili serĉis kaj ĉiujn aleojn kaj flankvojetojn ili trairis, kaj estis malfrumatene, antaŭ ol ili atingis la hejmon post sia malsukcesa serĉado. La edzo kaj la infano ankoraŭ dormis, ĉar Berto estis zorginta pri iliaj bezonoj. Ŝi estis sin suprenlejninta per la espero, ke ili estos sukcesaj; sed kiam ŝi vidis ilin returni solaj, ŝia animo tiom kiom la animo de la patrino maltrankviligis, kaj kvankam ŝi restis silenta, tamen la ofta uzado de ŝia antaŭ-tuko kaj la okuloj montris, ke ŝi sentas kiel patrino por iu en tia kompatinda situacio.

Promesante „reveni dum la mateno“, Berto kaj ŝia edzo foriris lasante la senkonsolan patrinojn kun sia ĉagreno.

Kiu penas priskribi la korpremon de tiu seninfanigita patrino? Kiel statuo ŝi sidadis, en ŝia brusto malĝojo tro profunda por larmoj. Horoj preteriris, kaj la unua pala strio de taglumo trovus ŝin ankoraŭ sidanta, kun la okuloj sen-

Maksimoj.

De Chamfort.
 Oni ne imagas, kiom da spirito estas necesa por ne esti ridinda.

Oni deziras la mallaboremon de malbonulo kaj la silenton de stultulo.

Oni malĝustigas sian spiriton, sian saĝon, sian konsciencen, same kiel oni malsaniĝas sian stomakon.

El franca lingvo tradukis *El Reg.*

„Nu eble mi eraris. Sed estas terura mateno elsendi du ŝafidetojn kiel ili. Beĵo,“ li diris mal-laŭtigante sian voĉon ĝis flustro, „mi scias, ke mi estas en la vojo, — mi ne povas fari ion krom resti sur la lito, kaj mi scias, ke vi kaj la infanoj devas malsati multfoje pro tio, kion mi ricevas, sed tio ne daŭros longe. Ne ploru! Vi scias, ke estas io kion ni ne povas aligi; kaj vi aŭdis, kion la pastro diris: „Estas unu super ĉio, kiu kontrolas ĉion por nia bono,“ kaj mi sentas, ke mia vico alproksimiĝas; sed mi ne fimas kiel mi iam kutimis; mi pensas ke la ŝanĝo estos pliboniĝo — kaj Li zorgos pri vi kaj la infanetoj.“

„Ho Jaka, ne jam parolu pri via foriro; vi plisaniĝos post ne longe.“
 „Neniam en ĉi tiu mondo, Beĵo. Venu, metu vian kapon sur la kapkusenon apud mi, mi pensas, ke mi deziras ripozi.“

Ŝi metis la infaneton sur la litkovrilon, metis sian kapon sur la kapkusenon kaj tute ellacigita pro la longa flegado, plorante ŝi ekdormis.

La preĝeja horloĝo jam sonoris la duonhoron antaŭ ol Tomĉjo kaj lia fratinego atingis la fabrikan korton, kaj la pordo estis fermita. La ventego ankoraŭ furiozitis, sed al liaj rediritaj petegoj por la enirpermeso la sama respondo venis: „Vi estas tro malfruaj, vi ne povas enveni antaŭ la matenmanĝa horo!“

Antaŭa sperto sciigis lin, ke lia penado eniri estus vana; kaj se nur estus li, kiu estas elfermita, li estus forinta kaj pasiginta la tempon tiel eble kiel li povus; sed la respondeco pri lia fratino instigis lin al denova penado, sed la pordgardisto estis reflektebla: — „Miaj ordonoj estas, ke neniu post la sesa dekkvin povas enveni; vi devus veni ĝustatempe same kiel la aliaj.“ Kompatinda Tomĉjo! Ĝis tiam ankoraŭ restis en lia brusto iom da fido je la homameco. Sed kiam li sin deturnis, la lasta fajrero estingiĝis. Peni hejmeniri, li sciis, estus malutile, kaj tial li serĉis la nuran alternativon, ian lokon, kie li povus trovi ŝirmon. Ne malproksime de la pordego, sed kie oni povus aŭdi la bradon de la rondirantaj radoj, li sidiĝis kun sia neplenĉanta fratino sur siaj genuoj.

La neĝo denove komencis faladi kviete, kaj li rigardis ĝin dum la plumecaj neĝeroj pli kaj pli grandigis. Li ne sentis la malvarmon nun; li volvis sian koltukon ĉirkaŭ sia fratino. La neĝo pli dense faladis: li sentis sin tiel trege lacega; lia fratinego ankaŭ dormis kontraŭ lia brusto; — li apogis sian kapon kontraŭ la malvarma muro, kaj la neĝo daŭris faladi, tiel malpeze, tiel senbrue, ke li ekdormis kaj songis pri sunbrilaj landoj, kie ĉio estas hela kaj varma; kaj post ne

„La leono estas ofendanto kaj krimulo,“ diris la bubalo. „La leono estas rabisto kaj mortigisto,“ diris la ĝirafo. „La leono estas maledikanto de mia plej sankta rajto,“ diris la cervo, „kaj tial ĝi meritas la morton.“

„Jes,“ kriis ĉiuj bestoj, „centfoje ĝi meritis la morton,“ kaj ili kondamnis ĝin je l' morto. Sed kiu estu ekzekutanta la verdikton je la terurulo?

Kaj denove la bestoj interkonsilis. La kamelo diris: „Kunulo, ni estu grandanimaj! Ni indulgu ĝin! Ni lasu al la ĥirpono la malbenitan vivon, sed ni devas ĝin fari sendanĝera: tial ni ĝin ekzilu!“

„Jes,“ kriis ĉiuj bestoj, kaj ili ĝin ekzilis. „Sed kiu kapablas, ĝin forpelu?“ Kaj la irian fojon la bestoj interkonsilis. Sed ili ne sciis eliron el la embaraso.

Fine diris la ĉevalo: „Kunulo, estas certe, ke la leono estas malhonoriga makulo en nia societo, kiun ni devas ekstermi. Sed povante nek morbitari nek forpeli la krimulon, ni ja povas ĝin starigi super la leĝon, farante ĝin nia reĝo.“

La ĉevalo konvinkis la bestojn, kaj ili donis al la leono la heredeban reĝecon. Kaj ili nun denove estis kontentaj kaj felikaj. Ĉar kiu estonte falus en la ungegojn de la leono, tiu havus la konsolan konscion, ke li povas morti por granda ideo.

El germana lingvo tradukis
Prof. J. Šušter, Saaz, Csl.

La sen viva kampo.

De Elin-Pelin.

Mi satas la kampon, ĉi tiun larĝan ebenajon, lumigitan per la horizonta linio. Mi ofte priskribis ĝin, mi ofte observis ĝin kaj mi ofte travagis ĝin. Ĉiam ĝi plaĉis al mi kaj mi trovis en ĝi ion belan, ion agrablan.

Hieraŭ unuafoje ĝi ne plaĉis al mi. Glaciigitaj strioj kuŝis tie ĉi kaj tie sur la velkinta herbo, sub kiu nigriĝis la tero. Malseka nebulo kuŝis super ĝi kvazaŭ malbona haladzo. Le vidigis rompta dometoĉa. Granda nigra birdo flugis malalte, malrapide kaj solece. Ĝi ne similis vivantajn, sed ian malgrandan fermaŝineton, kiu malvarmumis la aeron. Ĉe muelejo du viroj hakis grandan salikon, kaj tio memorigis ian terurigan malsanulejon, kie oni forhakas homajn piedojn. Ĉie estis malbele, malgaje kaj malvarme. La kampo estis sen viva.

El bulgara lingvo tradukis
Geo Haršev.

move rigardantajn antaŭ sin. La voĉo de ŝia edzo estis la unua afero, kiu vigligis ŝin el la kondiĉo de malespero, en kiun ŝi profundigis. Li parolis malfacile kaj lia voĉo estis tiel malforta kiel tiu de infano. „Beŝo“ li spiris, „ne lasu min plu. Ĝi pliproskismigis. Nia Tomĉjo kaj Suzi vizitis min dum vi estis for; mi aŭdis ilin vokantaj min, sed mi ne povis iri ĝis kiam mi estus havinta kelkvortojn kun vi. Mi timas, ke vi senios, ke la sorto estas malmola, virino, sed se vi trovos, ke vi ne povos surporti ĝin, petu la pastron diri al vi, kion li diris al mi, kaj tio konsolos vin.“

Beŝo ne povis respondi. Malĝojo supersutigis sur ŝin tiel malpeze, ke ŝiaj sentoj ŝajnis senvivaj; ŝi apenaŭ komprenis, kio estis dirata, sed en la maldolĉeco de ŝia animo ŝi surgeniĝis kaj ekploris: „Dio, helpu min!“

Ŝia edzo malforte prenis ŝian manon kaj tiris ŝin al si. „Li ja helpos vin, virino, ne timu! Unu kison, Beŝo; adiaŭ, Tomĉjo, Suzi. Estas tre mallume, mi kredas ke mi volas dormi.“

„Kaj antaŭ ol la hor' finiĝis,
Ĉion per la mort' riceveblan li sciis.“

III.

Saĝo okazis je la vetero baldaŭ post la reveno de Beŝo kaj Abĉjo, kelkloke sur la montflanko verdaj pecoj videbliĝis, kaj la malproksima urbo montriĝis kiel pejzaĝo de fumnigritaj tegmentoj, kiuj malseke brilis sub la pallumo de la suno. Apenaŭ iom da neĝo troviĝis sur la stratoj, kaj ĉiuj malbelaĵoj elstaris denove en siaj nudaj deformiĝoj.

La grandega vapormaŝino — la koro de la fabrikejo — estis ĉesanta sian batadon, por ke la laboristoj povu engluti la nutraĵon necesan ebligis ilin labori ĝis tagmezo. La pordoj malfirmiĝis, kaj la amaso elsvarmiĝis, sed ĉiuj instinkte sin turnis al grupo, kiu staris je ne tre malproksima distanco, kaj kies vizaĝoj rebrilis la korbŝirigan vidaĵon antaŭ ili. La grupo baldaŭ fariĝis granda homamaso. Demandoj estis farataj ĉiuloke de tiuj, kiuj staris en la ekstera rando — „Kio estas?“ „Ĝis la morto frostigitaj.“ Delikate tiuj neĝtilparolantaj viroj kun manoj per laboro malmoligitaj levigis la morte frostigitajn etulojn. Kelkaj tie sciis pri ili kaj estis aŭdintaj pri ilia perdigo. Estis al ili facile, diveni kiel ili moris, kaj malbenoj mallaŭtaj sed profundaj estis jetataj je tiuj, je kies pordoj la sango de tiuj nepekuloj kuŝas.

La kadavroj estis portataj al najbara hoteleto por atendi enketon. La aŭtoritatoj rapide atestigis; dume kelkaj, kiuj konis la gepatrojn, sin pretigis iri al ili kun la malĝojaj novaĵoj. — Kompatinda Beŝo, via taso da maldolĉeco pres-

Diversaĵoj. Simioĉasado en London.

Kiel la „reĝo de la tegmentoj“ estas superzifita. La longkoloraj raportoj de la anglaj gazetoj pri la antaŭnelongaj elektioj estis interrompataj en maniero, kiu evidente ĝoigis la legantojn. Inter la diskutadoj pri la ĉaso je elektistoj oni trovis subite la priskribon de ĉaso je simio.

La simio, propraĵo de enloĝanto de la kvarlato Camberwell, estis sukcesinta havigi al si la liberecon, kvankam ne la liberecon de la afrikaj prarabaraj, sed tiun sur la tegmentoj de la londonaj domoj. Tie ja ne troviĝas kokosoj, sed anstataŭe tre multe da fuĝo. La lerteco de „Joey“ — tiel nomiĝis la simio — promeni malrapide sur la tegmentoj, plej rapide kuraj kaj fari la plej burleskajn saltojn, alportis al ĝi en unu el la londonaj ĵurnaloj la almonon „reĝo de la tegmentoj“. La lerta prarabara burĝo scis dum du semajnoj elfugi al ĉiuj ĝiaj persekutantoj, kion ajn ili elpensis por kapti ĝin.

Komence Joey elektis al si kiel noktologojon la brunsvigan parkon kaj levigis ĉiam tre frue por enrompi kaj ŝteli. Ĝia specialaĵo estis malferrimaj fenestroj. Kiam ĝi ekvidis tian, ĝi rampis laŭlonge de la tegmenta pluvodfluilo, atente rigardis kun kruela rikano en la koncernen ejon kaj forkurigis per tio la enstantojn.

Poste ĝi ensaltis, ekprenis kion ajn, kio ŝajnis al ĝi manĝebla, kaj forfuĝis.

Foje iam kolektiĝis granda populamaso, kiu aranĝis sovaĝan ĉasadon super la tegmentoj, por ekhavi ĝin, sed ĝi ankoraŭ feliĉe sin savis. Alifoje oni vidis ĝin sidanta sur arbo: evidente tre malĝoja pro la malbona vetero, sed ĝi kontraŭstaris al la reziĝo de sia libereco.

Poste oni kredis havi ĝin fine. Virino havis la ideon, fermiglini la fenestron, post kiam Joey estis ensaltinta; poste ŝi ŝlosis la pordon kaj kuris al la polico por arestigi la enrompinton. Sed Joey interdume ekprenis pecon da saĝo kaj komencis manĝi ĝin. Ĉar la saĝo evidente ne bongustis al ĝi, indignite ĝi forĵetis ĝin tra la fenestron, detruis vitran platon kaj sekvis la saĝon tuj poste. Kiam oni venis, la nesto estis malplena.

Ĝenerale ĝi preferis ĉe siaj enormaj legombutikojn, el kiuj ĝi ŝtelis bananojn, pomojn, vinberojn kaj pl. La polico en sia malespero venigis fakulon el la zoologia ĝardeno, sed ankaŭ ĉi tiu ne povis kapti la kvarpiedan krimulon.

Unu vesperon oni starigis sur tegmento, kiun ĝi kutimis honori per sia vizito, grandegan musokapiton. En kiu du freŝaj krudaj ovoĵoj kuŝis kiel logaĵo. Je la proksima mateno la kapילו staris same malplena kiel la antaŭan vesperon, ek ankoraŭ pli malplena, ĉar la ovoĵoj estis malaperintaj kaj ankaŭ nature loĝoj.

Dum la tago ĝi ire aperis, tute malseka kaj spite de ĝia alta pozicio ire malbonhumora. Sed baldaŭ ĝi reakiris sian gajecon, kiam sur la strato amasiĝis granda populamaso, kiu observis ĝian kaptiĝon kun entuziasmaj aklamoj.

Ĉe la polico intervenis Joey nome ŭluge estis elektinta al si la preĝejon de Benhillroad kiel lokon, de kiu ĝi povis rigardi London kaj sur kiu ĝi montris siajn artaĵojn. La polico sendis du policanojn sur la turon por kuratako kun la mandato, aresti la forkurinton; sed ili

kaŭ pleniĝas. Maljuna Berto estis veninta laŭ sia promeso, kaj trovis Beŝon sveninta, parte kuŝanta sur la lito, ŝia brako ĉirkaŭ la kolo de li, kiu estis ŝia kunulo dum dekdaj jaroj. Ŝi levitis sin, banis ŝian frunton, kaj uzis ĉiujn rimedojn, por rekonscii ĝin. Post ne longe ŝi sukcesis; kaj post kiam ŝi estis preliganta la alian liton kaj surmetinta Beŝon sur ĝin, ŝi rapide foriris, por havigi helpon.

La malriĉuloj nur havas malriĉulojn, je kiuj ili povas dependi en urĝbezono; kaj estas beno, ke petoj por reciproka helpo estas malforte, se iam farataj, vanaj.

Ŝi baldaŭ revenis kun sufiĉe da helpantoj — unu prenis la infanon, la aliaj restis por fari la lastajn malĝojajn servojn al la korpo de tiu, kiu estis „irinta antaŭen“. Baldaŭ la viroj alvenis kun la malĝojiga sciigo, pri la trovo de la infano, sed Beŝo ne ĝin sciis. Dio havis kompatojn je ŝi kaj por malhelpi ŝian koron rompiĝi, estis jeta nubo super ŝian menson.

Dum la horoj preterpasis, multaj kolektiĝis ĉirkaŭ la hoteleto, kie la mortenketo kaj ĵurintaro kunveniĝis. Oni trairis la kutiman ceremonion de la rigardo de la kadavroj; kaj krom la maleolo de la knabino, kiu estis elarĝigita, oni ne povis trovi ion, kiu povus kaŭzi morton escepte la malvarmon.

La mortenketo rapide sumariĝis, kaj alparolante la ĵurintaron diris — „li ne scias, ke ili povus doni alian verdikton ol mortis pro naturaj kaŭzoj.“ Kun nur unu kontraŭstarulo ĉiuj konsentis kaj tiu rifuĝis konsenti al tiu verdikto, dirante, ke morto estis kaŭzita per nenaturaj kaŭzoj. Poste ili aliformigis la verdikton al „Trovia ĝis morto frostinta.“ Al ĉi tio unu ĵurinto deziris aldoni ion pri arbitraj leĝoj kaj malhomameco, sed oni kontraŭtis lin.

Nur estis bezonate, nun meti ilin en la teron kaj surkovri ilin. La sekvanatan matenon la fajfegiloj kriigis tiel furioze, kaj la radoj ruliĝis tiel rapide kiel kulime; du aliaj infanoj estis en la lokoj de la perditoj, kaj estis, kvazaŭ ili neniam estis.

La tago por la enterigo alvenis — la patron kaj la infanojn oni intencis enterigi kune. Estis granda amasiĝo de simpatiaj amikoj. Kompatinda Beŝo, parte resanigita, tamen ŝajnis kvazaŭ promeni en sonĝo; la malĝaja sekvantero atingis la tombejon. La ĉerkojn oni malrapide mallevis en la tombon. La voĉo de la grizhara pastro kelkfoje estis preskaŭ neaŭdebla — ĉiu koro sentis malĝojon, ĉar ĉiu pensis al si mem: „Se ili estis la miaj?“ „Polvo al polvo, kaj cindroj al cindroj,“ kaj la ceremonio finiĝis.

Nur estis kelkaj, kiuj ne rimarkis la ĉeston de nekonaŭte funebranto — iu, kies vestoj mal-

estis devigataj al malĝora returniro, kion salutis la strato-bubaro per ĝokriegoj. La du policanoj rampis, dikaj ledogantojn sur la manoj, kaj provizitaj per granda saĝo, sur la turon kaj eliris proksime de la pinto. Kun granda intereso atendis Joey ilian alvenon; sed kiam ili volis jeli la sakon super ĝin, ĝi forsaltis kun miriga facilmoveco.

Ĉiuspecaj aliaj iloj estis elpensataj aŭ rekomendataj, por kapti la simion: uzo de lato, bananoj, kiuj antaŭe estis metotaj en narkotikan medion, rostitaj terpoj varmegaj, kiujn oni sprucu per kloroformo, nukso kun hoko, je kiu pendus longa ŝnuro, reto, kiun oni jetu super ĝin, dum ĝi dormus, ktp.

li havis la ideon, ke oni invitu Jack Jarvis, la ratokapiston de la londona grandlanda konsilantaro, por la simioĉasado, ĉar li estus la unika, kiu povus ekhavi la simion, suozite, ke Jarvis ankoraŭ estus tiel vigla kiel iam. Sed ĉi tiu dubon la ratokapisto ne volis lasi sidanta sur si. Li ekmarŝis al la simioĉaso kaj fakte sukcesis, surprizi la simion. Kiamaniere Jarvis aranĝis tion? Li instalas sur la tegmento de preĝejo, sur kiu Joey kelkfoje aperis, kapiton per fojno maskitan, sur kiu estis Brucita per orienta narkotilo. Kiel logaĵo servis reze krudaj ovoĵoj. Joey fakte iris en la kapiton, post kiam ĝi estis evinta plurajn provojn kapti ĝin per lato, kiel ankaŭ la narkotadon per kloroformo jeta kontraŭ ĝi per sprucilo.

Jarvis estis gratulata de ĉiuj flankoj. Li rakontis, ke li sciigis pri la mistero de la narkotilo superinta la simion, de orientulo. Leonoj, figroj kaj aliaj sovaĝaj bestoj estas tuj venkataj de ĉi tiu ilo. Joey, kiu estas nur simio, do ne bezonas honori, ke ĝi estas kaptita tiamaniere.

(Laŭ „Neues Wiener Journal“, trad. H. Fahn, Wien.)

La hundo dum la vintro.

Dum la tempo, kiam ni pensas pri tio, kiel ni povu toleribliĝi la vintro per fajro, varmaj vestaĵoj ktp, ni ne devus forgesi, ke niaj hundoj bezonas nian prizorgon.

La gardhundo speciale bezonas tian prizorgon, ĉar ĝi submetiĝas al tempo, frostio, pluvo kaj neĝo.

Oni devas movi ĝian dometon en lokon ŝirmatan kontraŭ malvarmegal ventoj, ekzemple apud flankon de domo aŭ muro. Tegmentoj de hundejoj devas esti kovritaj per akvorezista materialo kaj havi la randojn kaj fendojn ŝtopitaj, ĉar la hundejoj ol la aliaj akra malŝanigas kaj mortigas pli da hundejoj ol la aliaj akra. Ĉiam oni devas starigi antaŭ la dometo super la tero lignan plankon, sur kiu la hundo povas kuŝi; la kota tero tute ne decas por la kompatinda besto.

Interne de la hundejo troviĝu seka, pura lito el fojno, pajlo aŭ rabotoĵoj, ofte renovata.

Korpa ekzercado estas pli necesa vintre ol altempe por ke la hundo estu feliĉa kaj sana. Ĝi ne povas esti varma, se ĝi estas alĉenita la tuta tago; baldaŭ ĝi fariĝos viktimo de ĉiuj hundmalŝanigoj, se ĝi de tempo al tempo ne povas kuri libere.

Promenado en pluvo ne difektas la hundon, se oni ĝin frostekigas, kiam ĝi revenas. Speciale estas necese zorgi pri la oreloj, kiuj estas sentemaj, kaj se oni lasus en ili akvon tio povus kaŭzi dolorigan malsanon.

Laŭ artikolo en Londona „Daily Herald“
de C. K. Johns tradukis E. A. H.

ke li estas iom eminenta sinjoro; kaj kiam la vidvino sin turnis por lasi la tombon, li alpaŝis al ŝi kaj oferis sian brakon al ŝi por subteno. Ŝi prenis ĝin aŭtomate, kaj ili promenis al ŝia soleca hejmo. Nur li krom maljuna Berto eniris kun Beŝo.

Li ĉirkaŭrigardis la forlasitan ĉambron, rigardante nun tien nun alian, por kaŝi sian emocion. Versaĝe li estis intencanta paroli, kiam frapo sur la pordo interrompis lin.

Berto malferrimis ĝin kaj revenis kun letero dirante ke la portanto bezonas respondon. La nekonaŭte prenis ĝin kun aŭtoritata maniero kaj rompis la sigelon; dum li ĉi tion faris, kvinfunta bankbileto flirte tate falis teren. Dum li legis la leteron, liaj okuloj kolere brilis, kaj lia tremetanta naziruo montris la feliĉecon de pasio furiozante interne.



Sin turnante al la knabo, li ŝovis la leteron en lian manon, kaj ordonis, ke li levu la bankbileton. „Prenu ĉi tiun respondon al via estro, knabo,“ li diris; „ni resendas la leteron kaj lian monon kun indigno, kaj diru al li ke Beŝo Green ne estas tiel malriĉa kaj senamika, ke ŝi bezonas akcepti kvin funtojn kiel prezon de du senpekaj vivoj. La ŝuldo estas tia, kiam neniu homo povas nuligi; sed la tago por kontakto nepre venos. Diru al li tion de la frato de Beŝo Green kaj la onklo de Tomĉjo kaj Suzi.“ La knabo forkuris kun la sciigo; kaj Beŝo, kiu vigligis per la fervoreco de la nekonaŭte, je la vorto „frato“ sin jetis je lia kolo, kriante: „Estas Georgio!“ Kio sekvis, estas rapide dirata: la ĉagreno de Beŝo estis profunda, kaj bezonis longajn monatojn antaŭ ol ŝi estis taŭga entrepreni la ordinaran aferojn de la ĉiutaga vivo. Sed ŝango de loĝejo kaj gajiga kunularo, kune kun la ĉiutage kreskanta beco de ŝia infano, parte resanigis ŝian ŝiritan koron. Ŝia malavara frato, kiu estis reveninta el malproksima lando — kie la sorto estis favorega al li — prenis ŝin loĝadi kun li, kaj adoptis ŝian infanon kiel sian filon. Berto kaj Abĉjo instaligis en la domo kiel helpantoj; kaj nun, tre malproksime de la regiono de fabrikejaj fajflegoj, ili amike loĝadas kune.

„Jen mia historio por ĉi tiu kristnasko. Kiel vi ŝatas ĝin?“

„Estas tre malĝoja, Onklo Johano, sed ni multe dankas vin por la rakonto, sed estas vera hontindaĵo, ke tiaj junaj infanoj estas devigataj iri al la laboro je tia frua horo?“

„Mi konsentas kaj mi ĝojas ke tiaj kondiĉoj iom post iom foriras kaj mi esperas ke vi ĉiuj, kiam vi povos, faros vian eblon helpi la forigadon de io, kio kaŭzas malfeliĉon kaj mizeron.“

El angla lingvo irad. F. Hadfield, Milusbridge.



La Domo de Radio-Industrio en Berlin.

Jam en nia numero 224 de 13. 12. ni publikigis radio-paroladon de s-ano Direktoro Glück pri la malfermo de la Radio-Ekspozicio en Berlin. Hodiaŭ ni povas prezenti al nia legataro du bildojn de la Domo de Radio-Industrio, grandioza halo de miriga impresio. La halo, kies konstruado, pro ĝia speciala celo, estas farita el ligno, havas longecon de 150 m kaj larĝecon de 40 m. Oni nun konstruas apud la halo radioŭron, kiu havos alecon de 155 m kaj kiu estos preta en printempo 1925. Provizore ekzistas tie malpli alta turo (85 m).

La preciza signifo de la Geneva Protokolo.

En la lasta julio estis ellaborita en Genève, en la Ligo de Nacioj, protokolo pri arbitracio kaj sendangereco, kian jam aprobis 16 nacioj. En tre interesa artikolo, aperinta en la grava komerca revuo „Les Echos“ (2, rue Martel, Paris), simpatisanta nian movadon, s-o Georges Scelle, estro de la kabineto de la Ministro de Laboro s-o Justus Godart, analizas la problemojn laŭ jura vidpunkto: „S-o Georges Scelle estas, kvankam juna, sed jam eminenta profesoro de internacia juro en la Dijona Universitato kaj aŭtoritato en tiu fakto, same kiel en la sociaj problemoj. Li estas membro de la Honora Komitato de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto. Ni publikigas la ĉefajn partojn de la artikolo.“

„En difinita societo, en ŝtato, la civitanoj ne povas mem juĝi sin, sed estas devigitaj submeti ĉiujn siajn procesojn al juĝistoj. Ĝi devenas de tio, ke la tuta socia agado de civitanoj estas reguligita per leĝoj, kiuj certigas al ĉiu el ili sufiĉan liberecon de agado kaj garantias kontraŭ kontraŭleĝeco aŭ perforto de iliaj najbaroj. Neniu civitano povas vidi ke liaj ĉefgravaj kaj esencaj interesoj estas minacataj de la najbaro, ĉar la leĝo lin protektas. En la internaciaj rilatoj, kontraŭe, estas multaj fakoj, kie la leĝo ne ekzistas kaj kie la ŝtatoj estas suverenanaj, t. e. ke ili havas la absolutan liberecon agi kiel plaĉas al ili, eĉ malutile al la ĉefgravaj interesoj de siaj najbaroj. Oni povas citi tre multnombrajn ekzemplojn, precipe en la ekonomia fakoj.“

„Ŝtato ne estas devigata meli siajn havenojn, siajn komunikvojojn, nek sian teritorion je la dispono de siaj najbaroj, escepte specialan konvencion. Ŝtato ne estas devigata malfermiĝi al enmigrado de siaj najbaroj. Ŝtato estas majstro de siaj doganoj, eĉ ĝis la proklamo de enute malpermesaj tarifoj. Ŝtato estas majstro de siaj krudmaterioj, kiujn kaŝas ĝia grundo, kaj de la nutraĵoj, eĉ surabundaj, kiujn ĝi povas produkti. Ĝi povas monopoligi la ambau, malprofite al la resto de la universo. Ŝtato estas majstro de sia loĝantaro kaj povas malpermesi al ĝi rilatojn kun la najbaraj loĝantaroj; same ĝi povas kontraŭstari la deziron de tiu loĝantaro, ŝanĝi suverenenon kaj aliĝi al najbara ŝtato. Ni limigu nin al ĉi tiu simpla elnombro de la plej gravaj kazoj. Ili sufiĉas por montri, ke ŝtato povas malutili en la plenumo de sia suvereneco, t. e. de sia rajto rilate al aliaj ŝtatoj, kaj jure ne estos eble malhelpi ĝin. Ĝi povas, puŝante la aferojn ĝis ekstremo, malsatigi ilin, ilin senigi de la plej esencaj nutraĵoj al ilia komercio aŭ industrio, fortranci iliajn komunikadojn, fermi la pordojn al la enmigraĵa movado ktp.“ kaj ne estos ebleco de juĝo per iu ajn tribunalo.“

Doninte tiun bildon, la aŭtoro konstatas, ke la Arbitracia Kortumo de Haag povas juĝi nur, kiam estas speciala konvencio Alie, la koncerna ŝtato respondos ke temas pri ĝia suvereneco.

Koncerne la ĝeneralan arbitraciojn la aŭtoro skribas jenon: Tia promesdevigo sur papero estas danĝera, ĉar registaro ne povas antaŭscii, kiaj konfliktoj naskiĝos, kia estos ilia graveco, kun kia alia ŝtato, lojala aŭ mallojala, ĝi havos konflikton, kiaj estos eventuale ĝiaj juĝistoj (kiuj estos por ĝi fremduloj) kaj precipe, kiam leĝo oni aplikos al ĝi, ĉar tiu ĉi leĝo ne ekzistas, je la momento, kiam ĝi sin promesdevigas. Tia protokolo de deviga kaj ĝenerala arbitracio, tiamaniere ellaborita en la malpleneco kaj abstrakteco, ne ekzistos ses monatojn.“

Post tiaj argumentoj, s-o Scelle diras: „Tio ne signifas, ke ne ekzistas rimedo kaj ke, en ĉi tiu tragedia dilemo, oni devas rezigni al la konstanta milito. Ne. La solvo konsistas en distingo de arbitracio unuflanke kaj repa-

ig o aliflanke. La arbitracio kondukas al deviga decido, kiu povas esti neiga. La ŝtatoj, en la ĉefgravaj problemoj, ne povas saĝe sin promesdevigi sendistinge kaj senlime akcepti La repacigo, kontraŭe, alkondukos al kompromiso proponita al la procesferantaj partioj, kiuj povas ĝin akcepti kaj ankaŭ forjeti. Oni do povas ĉiam devigi la registarojn akcepti la repacigon, ĉar ĝi lasas netuŝebla ilian finan liberecon. Oni ne povas devigi ilin akcepti arbitracion, kiu ilin antaŭligas al decido, kiu povas esti pereiga. Certe, oni kontraŭdiros, ke repacigo ne ĉiam malhelpas al la milito. Tio estas ĝusta. Sed, en la praktiko, la repacigo estas ĵusta, se ĝi havas malantaŭ si la universalan publikan opinionon, la konsenton de la preskaŭa plimulto de registaroj; ne estos morale eble al ŝtatoj procesferantaj elturniĝi el ĝi. Cetere, dum la tuta tempo, kiam daŭros la procedado, la konflikto malakriĝos, la praktikaĵ solvoj aperos kaj la milito fariĝos pli kaj pli malcerta, ĉar ĉiu prokrastiita milito estas malsukcesinta milito.

„Por ĉion diri malŝance, ni respektu jenan gradigon: 1. Por juraj konfliktoj, t. e. por tiuj, kiuj havas internacian leĝon, traktato aŭ antaŭekzistanta konvencio; kompetenteco de la Haga Kortumo, kiu juĝas jure; 2. por ĉiu konflikto, kie la ŝtatoj akceptas la arbitracion, arbitracia deviga decido; 3. por ĉiuj eventualaj konfliktoj, deviga repacigo, principe, sed kun solvo de nedeviga kompromiso.“ La aŭtoro esprimas la deziron, ke kiel eble plej multaj problemoj, kiaj laboro, higieno, komunikoj ktp. estu reguligataj helpe de la Ligo de Nacioj kaj ke la jura fakto anstataŭigu la suverenan.

„Tia, kia ĝi estas, la protokolo estas certe progreso kontraŭ la sistemo de la Traktato de la Ligo de Nacioj kaj, sekve, nova paŝo al la idealo de la konstanta paco restas la fina celo de la internacia organizo. Tiu internacia organizo realiĝos per la influo de la Rajto sur la tuto de la interpopolaj rilatoj. En aparta ŝtato oni bezonis jarcentojn por atingi tion. Oni akceptis ke inter ŝtatoj oni bezonas almenaŭ kelkajn jardekojn. Ni estas sur la vojo kaj ni iras rapide, sed, dezirante forigi la etapojn, malmesfiante la realaĵojn kaj malkonsiderante la barilon, oni riskas ĉion kompromiti.“

Scienco. Egiptologio.

La vortaro de la egipta lingvo.

El Berlin oni raportas: Estis certe la plej granda ĝojo por la honesta majstro de l' egiptologio, sekreta konsilanto Adolf Ermann, vidi je sia 70-a naskiĝtago la finon de sia granda organiza verko „La vortaro de la egipta lingvo“. Tiu ĉi vortaro, eldonita de la germanaj akademiuloj de la scienco, estis 27 jarojn en preparo, kaj scienculoj de ĉiuj popoloj kunlaboris je ĝi. La vortaro, pri kiu la scienculoj mem raportis en la al li dediĉita festnumero de la Orienta Literatur-journalo, konsideras egalmesure la periodojn de la egipta lingvo ĝis la surskribajtoj el la greka epoko. Ĝi enhavos kaj per citaĵoj ilustras ĉiujn vortojn kaj signifojn, kiuj ĝis hodiaŭ estas certigitaj. Ĝi almoniros la rilatojn de la egipta lingvo posedadoj al la semida nur, kie ili povas esti rigardataj kiel certaj. Detala listo de la germanaj vortoj faciligos ankaŭ al la ne-egiptologio la uzadon de la verko. Ĉar la hodiaŭaj cirkonstancoj ne permesas, presi tiel multenhavan verkon per hieroglifaj tipoj, ĝi estos farata aŭtografie, kaj estos tial pli malmultekosta. La eldono estas komisiita al profesoro Grapow. M. W.

Apliko de aluminio en dentotekniko.

Delonge la dentistoj serĉas metalon, kiu povus anstataŭi en preparado de artefaritaj dentoj la

multekostan oron. Post longa vico da eksperimentoj oni nun konstatis, ke la plej taŭga metalo estas aluminio. Ĝia malkareco ebligos dentistan helpon al larĝaj laboristaj masoj.

La eksperimentoj per aluminio kaŭzis akrajn disputojn. Precipe oni kulpigis la aluminio, ke ĝi oksidiĝas en buŝo kaj rapide solviĝas. Sciencaj esploradoj pruvis la malon: dum longa tempo estinte sub influo de plej uzataj nutraĵoj, aluminio solviĝis en ili en tiel minimuma kvanto, kia ne havas ian signifon por homa organismo. Oksidiĝo tute ne estis konstatebla. Ankaŭ salivo neniel efikas aluminio.

Serioza argumento kontraŭ apliko de aluminio estas, ke ĝi rapide eluziĝas pro sia moleco. Tiu mankon dentotekniko sukcesis forigi. Necesas nur fari la koronojn fanditaj; fandita aluminio estas malmola kiel fandfero.

H. Frank, Leningrad.

Tekniko.

Laŭte parolanta telefono en preĝejo.

En granda malnova preĝejo de Westminster Abatejo en London estas enkondukita novaĵo eksterordinara kaj samtempe praktika. La amasoj da preĝantoj, kiuj troplenis la preĝejon, lutage rimarkis kun mirego, ke la vortoj de la predikistoj estis aŭdeblaj tute klare en ĉiuj anguloj de la preĝejo, pri kio antaŭe pro grandeco de la konstruaĵo ne povis esti eĉ parolo. Tiu miraklon plenumis lokitaj en anguloj laŭte parolantaj aparatoj telefonaj, kunigitaj kun mikrofono sur la ambono starigita. Pro la bonegaj sukcesoj tiamaniere atingitaj, la laŭte parolantaj telefonoj estas aplikotaj ankaŭ en aliaj grandaj preĝejoj anglaj.

Trad. J. Receptor.

Paco.

Nobelkomitato de la Norvega Parlamento decidis ne eldoni la Nobel-premion por paco en jaro 1924.

Fritiof Ahnfeldt, Torskovs, Svedujo.

Muziko.

Mozart kaj Goldoni en unu opero.

Certe malofta prezentado okazis en la budapestista opera teatro je fino de novembro: oni prezentis operon kun muziko de fama muzikverkisto Mozart, sed la teksto de la opero ne estis la sama, al kiu Mozart skribis la operon originale.

Aleksandro Hevesi, Mozari-esploranto kaj lerta registaro, entreprenis la ne ĉiutagan laboron kaj kunfandis la muzikon de Mozart, kiun li originale verkis por la ne sukcesinta teatraĵo: „La finia giardiniera“ de Calsabigi, kun tute alia teatraĵo: „La locandiera“ de Goldoni. La kunigo bonege sukcesis, kion pravas ankaŭ la prezentado de la budapesta operdomo. Hevesi nur kelkfoje devis ŝanĝi la originalan operon per aliordigo de la kantoj, sed cetera la muziko tute altaĝiĝis al la teksto de la konata komedio de Goldoni. La originala teksto de Calsabigi estis tiel malbona, ke germana konata estetistiko Oskar Bie diris pri ĝi: „Simple terura!“ kaj la muziko de Mozart vere meritis ludeblan tekston. Mozart estis 19-jara, kiam li ricevis la taskon de bavara princo Maksimiliano fari muzikon al la teksto de Calsabigi, al kiu — mirinde — jam du aliaj muzikverkistoj, Piccini kaj Anfossi, verkis muzikon. Kiuj deziras gardi, kiel dogmon, la originalon de verkisto, certe ne juĝos favore pri la interesa muzika eksperimento de Hevesi, sed la melodioj de Mozart tamen sukcesigis ĝin. Kaj se oni devas elekti, ĉu oni ne ludu klasikan opermuzikon pro neludebla teksto aŭ ĉu oni ludu ĝin kun tute konformigita teksto, certe la veraj muzikamantoj elektos la novan tekston.

Filatelio.

Bonfaraj poŝtmarkoj en Nederlando.

En Nederlando estas eldonata serio de tri poŝtmarkoj, en la valoro de hfl. 0.02, 0.07 1/2 kaj 0.10. Kun plialtigo ili kostas hfl. 0.04, 0.11 kaj 0.12 1/2. La profito estas dediĉita al la nezorgitaj infanoj.

C. G. en Helder.

Radio.

La ondoj, sur kiuj disaŭdigas diversaj eŭropaj stacioj.

Aberdeen 495	Leipzig 454
Belfast 435	London 365
Beograd 1650	Madrid 392
Berlin 450, 505	Manchester 375
Birmingham 475	München 485
Bournemouth 385	Münster 410
Breslau 418	Newcastle 400
Brno 1800	Paris 1780
Bruxelles 265	Ecole Sup. P. T.T. 450
Budapest 950	Eiffelturo 2600
Cardiff 351	Petit Parisien 345
Centocelle 1800	Praha 1150
Chelmsford 1600	Roma 624
Frankfurt 470	Stockholm 470
Glasgow 420	Telegraftrafiko 450
Göteborg 460, 700	Stuttgart 445
Hamburg 395	U. R. I. (Unione Radiofonica Italiana) 425
Köbenhavn (Lyngby) 2400	Wien 530
Königsberg 465	Zürich 650.
Königs wusterhausen	
[2800, 680, 2450	

Oficiala akcepto de Esperanto per politika partio.

Dum la dua parti-kongreso de la „Germana Socialdemokrata Partio de Polujo“ en Bielsk (Bieliŝ), Pola Silezio, okazinta la 7.—8. 12., faris depuŝito de la Pola Parlamento s-ano Artur Pankraŝ raporton pri „Esperanto kaj ĝia signifo por la socialismo“. La konvinkta parolado de s-o Pankraŝ havis tian sukceson ke la parti-kongreso unuanieme akceptis sekvantan rezolucion:

„Konsiderante la gravecon de facile elernebla internacia neŭtrala lingvo kiel komprenilo por la internacia proletariato, kiu ne povas okupiĝi pri longjara kaj multekosta studado de lingvoj, la 11-a parti-kongreso de la Germana Socialdemokrata Partio de Polujo rekomendas al siaj membroj la studadon de la lingvo Esperanto disvastiĝinta jam en ĉiuj landoj kaj alvokas al la aliaj socialistaj partioj labori en la sama senĉo.“

Tuj post tiu sukcesa parolado de s-ano Pankraŝ petis delegitoj el la socialistaj grupoj en Katowice, Królewska, Huta kaj Bielsk pri esp. instruado kaj organizado de esp. sekcioj socialistaj.

En Bydgoszcz (Bromberg) okazas ĉiumarde kaj -vendrede en loka laborista kazino de 25 p. vizitata esp. kurso organizita kaj gvidata laŭ propra iniciato de esp. laboristo. Laŭ ilia peto faris s-ano Fr. Prengel, gvid. de „Pola Esp. Servo“, enkondukan paroladon pri „La celo de esp. lernado“. Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

La lastaj tagoj de s-ino Klara Zamenhof.

Certe interesos la esperantistaron, eksciti ion pli detalan pri la lastaj vivtagoj de la majstro-edzino kaj pri la malsano, kiu fine kaŭzis ŝian morton.

Jam antaŭ sia vojaĝo al la 16-a Kongreso en Wien, s-ino Zamenhof faris malbone, havante oftajn dolorojn en la hepato. Tamen ŝi riskis la vojaĝon.

Post la kongreso ŝi decidis vojaĝi al ĉeĥoslovaka kuraĉloko, kie ŝi restis kvar semajnojn; sed ŝia farto ankoraŭ pli malboniĝis.

Du tagojn post la reveno ŝi enligiĝis kaj jam ne leviĝis. Tamen ŝi daŭre interesiĝis pri la stato de la esp. movado kaj precipe ekĝoĝis ekscianta, ke la monumento por la tombo de ŝia edzo alvenis Danzigon.

La 9 nov. la kuracisto, dezirante plicertigi la diagnozon, decidis operaci ŝin. Dum la operacio oni konstatis kanceron en la hepato, kaj la stato fariĝis senespera. Post dusemajna restado en hospitalo oni hejmvienigis ŝin.

La konscion ŝi havis ĝis la lasta tago. La 4 dec. s-ino Zamenhof sentis sin pli malforta kaj pensis jam pri la morto. La 6 dec. malene ŝi vokis la infanojn dezirante adiaŭi ilin. La saman tagon, je 6 h. vespere, ŝi tute perdis la konscion; je 9 h. vespere ŝi ekdormis por la eterna dormo.

A. O.

Poŝtabonantoj

atentu pri nia nova titolo post novjaro „Heroldo de Esperanto“.

La germanaj poŝtabonantoj de ET.

Per vigla vardo ni sukcesis, plialtigi la nombron de niaj germanaj poŝtabonantoj en la lastaj du monatoj de ĉ. 600 al pli ol 1000, kiuj troviĝas en pli ol 350 diversaj urboj kaj vilaĝoj.

En sekvantaj lokoj ekzistas 5 aŭ pli da poŝtabonantoj (la grandaj urboj inkluzive antaŭurboj):

Berlin 36, Essen 35, Dresden 30, Köln, Leipzig kaj München po 24, Bochum 23, Chemnitz 20, Breslau kaj Wiesbaden po 15, Freiberg (Sa.), Halle kaj Nürnberg po 14, Magdeburg, Mainz kaj Stutgarti po 12, Frankfurt a. M. 11, Bremen, Mannheim, Waldenburg kaj Zittau po 10, Burkhardsdorf en Erzgebirge, Erfurt, Glauchau, Hamburg, Plauen kaj Rheydt po 9, Augsburg, Braunschweig, Danzig, Düsseldorf, Fürth, Königsberg kaj Landshut po 8, Euskirchen, Kreuznach, Recklinghausen kaj Regensburg po 7, Ebersbach (Sa.), Potsdam, Riesa, Selb kaj Werdaŭ po 6, Auerbach i. V., Görlitz, Hagen, Krefeld, Würzburg kaj Zwickau po 5.

Mirigas la relative granda nombro en kelkaj malgrandaj lokoj unuflanke, ekz. Freiberg (Sa.), Waldenburg kaj Burkhardsdorf, kaj la relative malgranda nombro en kelkaj grandurboj aliflanke, ekz. Düsseldorf, Frankfurt, Hamburg (nur 9), Charlottenburg (4), Elberfeld-Barmen (4), Hannover (nur 3), Lübeck (nur 2), Aachen kaj Dortmund (nur po 1) ktp. Ĉu ne devus ĉiu urbo, kie ekzistas grupo, klopodi ke ET estu tie legata en minimume 5 ekzempleroj, por ke la kuraga projekto de ĉiutaga esp. ĵurnalo ne restu bela sonoĝo por multaj jaroj sed plejeble baldaŭ efektiviĝu?!

Poŝtabonantoj atentu la novan titolon post novjaro „Heroldo de Esperanto“.

Kroniko.

Germanujo.

Dresden. La loka societo aranĝis la 13. 12. en salono de „Hilf. Dörchen“ Zamenhof-feston. Sed, ho vel, la festo devis esti aranĝata samtempe kiel funebra sotoŝo por la juŝa mortinta s-ino Klara Zamenhof: nigraj vualoj kovris la esp. flagojn kaj en la fiera rememoro pri la majstro miksiĝis sinceraj vortoj de l' bedaŭro. Post parolado de D-o H. Arnold sekvis muzikaĵoj, kanto kaj deklamoj. En paŭzo de la programo la prez. s-o Karsch atentigis i. a. pri la grandstila jarfesto okazonta la 1. 2. en „Vereinshaus“.

Gummersbach. La loka grupo aranĝis feston je „Hermannsburg“ pro la naskiĝdato de nia majstro; ĉ. 100 p. — je l. 12., komencis je la superrealejneco du kursoj (60 lernantoj), gvid. instruistoj D-o Bratler kaj D-o Köddig.

Köln. S-o instr. Dahmen el Horrem gvidas kurson por gvidantoj de esp. kursoj; partoprenas 20 p.

Nederlando.

Haag. La grupo „Fine ĝi venkos“ aranĝis bone sukcesintan festvesperon je 15. 12. Teatraĵoj, kanto, muziko kaj lumbildoj pri la kongreso formis la interesan programon.

Polujo.

Łódz. Post ekspozicio la movado revigliĝis. Funkcia filio de „Laboro“ lunde kaj ĵaŭde je 8 h. vesp. Kurso kun 15 p. (gvid. s-o Dembinski) finiĝis. Novan kurson kun 50 lernantojn de ŝtataj lernejoj gvidas s-o Lejzerowicz. En la societo funkcias aktuala esp. leĝejo. Okaze de la morto de s-ino Zamenhof la societo dispendigis en la urbo mortanoĉojn en Esp.

Leterketo.

L. R. en W.-T. Vi skribas: Ĉu ne estus rimarkinde aldoni alvokon al tutmonda esperantistaro: fotografistoj, amatoroj, edzinoj de esperantistoj, kemiistoj kaj aliaj -istoj esperantistaj, ke estu uzataj nur aĵoj kun klarigado ankau en Esperanto inter aliaj lingvoj? — Ni opinias, ke por tio la tempo ankoraŭ ne tute venis. Sed kompreneble estas jam nun nepre rekomendinde, ke esperantistoj preferu laŭeble tiujn firmojn, kiuj iel uzas aŭ favoras Esperanton.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresata ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, libraj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

278. Paneŭropo.

Leginte la artikolon de s-o Glöckner pri „Paneŭropo“ mi tuj skribis kaj petis scigon pri la afero de „Paneŭropa Unio“, kompreneble esperante. La 25. 11. mi ricevis respondon, sed bedaŭrinde germanlingve. Ĉu ne estus devo de ĉiu alilingva sed esperantista intereso postuli la korepondecon en Esperanto? Kiel ankau estus bone, se oni tuj, sen tempopero, tradukus la certe interesegan libron en Esperanton, ĉar la ideo vere meritas grandan subtenon de ĉiuj bonaj eŭropanoj. Mi eĉ scias, ke multaj homoj jam havis saman ideon. Certe iom post iom efektiviĝos la „U.S.E.“ (Unuigitaj Ŝtatoj Eŭropaj), kiel sisteme ĉiuj malgrandaj kaj grandaj ŝtatoj kaj ŝtatoj de Germanujo trovis unuecon; mankas nur gvidantoj kaj la ĉiujn diverslingvajn popolojn interkompreniganta lingvo.

Pro tio estas necese, ke ĉiu esperantista intereso tuj tiasence skribu al Paneŭropiŝta Unio, Wien VI, Gumpendorferstr. 37. S. Manner, Laihia, Finl.

279. Mallongigo de „ĉevalpovo“.

En ET 207 kaj aliloke oni mallongigas „ĉevalpovo“ tiel: H. P. Sed kvankam la „P.“ povas signif „povon“, la „H.“ ne povas signif „ĉevalon“. La literoj H. P. signifas „Horse Power“, i. e. angla mallongigo. Efektive estas malĝuste uzi anglajn mallongigojn por esp. vortoj. Ni skribu „ĉ. p.“ aŭ „ĉP“. Pli spertaj samideanoj esprimu sian opinion, mi petas. Olavo Kristjánsson, Islando.

Nia konkurso n-o 1.

Esperanto renversita.

En la hodiaŭa numero ni komencas la publikigon de artikolo. Sed post la kompostado de la teksto nia lernanto Karlĉjo havis la malfeliĉan renversi la kompostojn. Por ke oni ne rimarku lian malfelaton, li ree kunmetis la literojn de ĉiu vorto, sed laŭ neĝusta sinsekv. Por legantoj, kiuj sukcesos rearanĝi la literojn laŭ ĝusta sinsekv, ni starigis premiojn. La artikolo aperos iom post iom, ĉiufoje po unu frazo. Je la fino de la publikigo oni sendu la solvon de la tuta artikolo. La premioj estas: 1. Senpaga jarabono al „Heroldo de Esperanto“, 2. luksa, tute bindita ekzemplero de „Tragedio de Homo“, la plej bela libro en Esperanto, 3.—5 tri kvaronjaraj abonon al „Heroldo de Esperanto“, 6.—10 libroj simplaj.

La unua frazo.

Iuĉ turkulciona aĥsva aĥorn terzagano.




Fig. 1.

Fig. 2.




Fig. 3.




Fig. 4.

Kvinpinta stelo per unu tranĉo.

Kiel oni povas tranĉi el papera kvinpintan stelon per unu tranĉo, tion montras ĉi-supra desegno.

Fig. 1. Oni prenas kvadratan paperon kaj faldas ĝin en la mezo (laŭ linio c-b) tiel ke punkto a restas ekstere dekstre malsupre.

Fig. 2. Oni prenas la supran maldekstran angulon (c) antaŭen kaj metas ĝin sur linion b-a (en punkto e).

Fig. 3. Oni faldas la paperon laŭ linio d-g malantaŭen tiel ke punkto f koincidas kun punkto e kaj rando d-f koincidas kun d-e.

Fig. 4. Oni tranĉas laŭ linio i-e kaj jam havas la kvinpintan stelon. Ju pli proksime la punkto i estas de d, des pli pinta fariĝas la stelo.

Sciligis s-ano G. Steiner, Győr.

Urĝa peto.

Kiu volas helpi por plifortigi kaj kreskigi la Esperanto-aferon en Hindujo? En Nederlando Hindujo ne estas multe da esperantistoj, ĉar oni ankoraŭ ne faris multe da propagando.

Subskribanto volos propagandi per presaĵoj en aŭ pri Esperanto, sed havas nenion por vidigi al la varbotoj.

Tial li petas, gasamideanojn ĉiulandajn sendi al li gazetojn, kantojn kaj diversajn esperantajjn, ĉar tuj post la propagando li volas malfermi senpagan Esperanto-kurson en la urbo Soerabata (elp. Surabaja).

H. J. Tuinder, elektristo.

Departemento de Marino, Batavia, Nederl. Hindujo.

Nekrologo.

La varsoviaj membroj de UEA funebrias pro la morto de aliŝtata majstrino s-ino Klara Zamenhof

kaj per tio ĉi esprimas al la familio sian kondolencon.

A. Oberrotman, Varsovio Del. UEA.

Rekomendata de la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto.

La eldonon de la sola arta literatura monata esperanta revuo

Literatura Mondo

transprenis:

Hungara Esperanto-Instituto, Budapest VI

Eĉtvoĝ-u. 3.

Ĉiu grupo kaj literaturamanto nepre helpu la gazeton per abono kaj disvastigo. Po ekzemplero: 12000 hung. kronoj (0.70 ŝilingo).

Konlaborantoj:

la plej konataj esperantaj verkistoj el ĉiuj landoj.

Vi devas subteni nian solan literaturan revuon!